

Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

julio (1) - '92

Ĉu eblas malhelpi?

Piratado de esperantaj verkoj!

Ekde la fondo de *Esperantlingva Verkista Asocio (EVA)* en 1983, mi atente sekvis la disvolviĝon de tiu faka asocio por kontroli, ĉu ĝi plenumas la originajn celojn formulitajn en ĝia statuto, kaj ĉu ĝi kapablas efektiviĝi la diversajn planojn, kiujn faris Tibor Sekelj, la unua prezidanto. Oni povas legi pri la celoj kaj planitaj agadoj en la priskribo de EVA en la Jarlibro de UEA (vidu la rubrikon "Por via notlibro" - la red.) Objektiva ekzameno de la preskaŭ dekjara historio de EVA indikas, ke tiu organizaĵo - same kiel pluraj aliaj fakorganizaĵoj en Esperantujo - plenumas malmulton por la propraj membroj kaj havas nenian efikon aŭ influon sur la esperantistaron ĝenerale.

Grandiozaj projektoj

Ĉar dekomence prezidanto Sekelj elcerbigrigis tro grandiozajn projektojn por la nova asocio, mi avertis lin, ke estas konsilinde unue okupiĝi nur pri tiuj planoj, kiuj estas facile efektiveblaj. Bedaŭrinde, li, kiel eterna revemulo rifuzis bremsi sian ideofluon por agi pli realece. Pro tio, dum la sekvaj jaroj oni vane atendis seminariojn por verkistoj, literaturajn festivalojn kaj lanĉon de la eldonserio *Esperantaj klasikajoj*. Sendube la plej granda manko en EVA estas revuo aŭ gazeto, kiu povas funkcii kiel forumo por membroj kaj informilo por aliaj esperantistoj. Ja estas nekredeble, ke ĝuste organizaĵo de verkistoj ne havas sian propran organon!

Senskrupulaj eldonejoj

Unu el la specifaj projektoj, pri kiu EVA laŭstatue devas okupiĝi, estas maniero protekti esperantistajn aŭtorojn kontraŭ piratado de iliaj verkoj. Ne estas sekreto, ke en diversaj partoj de Esperantujo, senskrupulaj eldonejoj publikigas verkojn sen peti permeson de la origina eldonejo kaj sen pagi tantiemon al la verkinto. En 1987 mi atentigis Sekeljn pri tiu malagrabla situacio kaj informis lin, ke kvankam UEA scias pri tiu kontraŭleĝa agado, ĝi ne alprenis oficialan starpunkton por kondamni la misfaradon. Pro tio mi argumentis, ke la tasko nepre apartenas al EVA, kaj mi petis Sekeljn formale prezenti la problemon al la membroj de EVA, por ke estu trovita praktika maniero protekti kopirajtojn kaj puni malhonestajn eldonistojn. Dum preskaŭ unu jaro Sekelj silentis pri tiu temo. Kiam mi konstatis, ke li estas indiferenta, mi komencis verki artikolojn por informi la publikon en Esperantujo pri piratado. (daŭrigo sur la paĝo 7.)

La kasedo kaj kompaktdisko de "Tutmonda Muziko":

Novaj sonoj en la esperanta rokmuziko

Ekde kelkaj monatoj en Germanio, apogite de grandega varbkampanjo en kaj ekster Esperantujo, muzikkasedo kaj kompaktdisko vekas multe da atento. "Fakuloj juĝas la novan popmuzikon en esperanto boooonega", vi povis legi ankaŭ en anonco en *Koncize 1/92*, kie vi trovas informojn pri la akirebleco. Nu, mia juĝo ne plene kongruas kun tio; mi preferus emfazi, ke ĝi simple estas verko kun pozitivaj kaj negativaj flankoj.

de homaj sentoj. Male, en la tekstoj de *Tutmonda Muziko* mi ne trovis ion tian, kio povus igi ilin ravaj aŭ valoraj. Komparante la kontraŭmilitan kanton *Ne plu* de Tutmonda Muziko kun la samtema *Jam estas la hor'* de la kasedo "baf" (Edistudio 1985), oni rimarkas, ke la niveloj de la tekstoj ekstreme diferencas. Nu, mi koncedu, ke temas pri diversaj specoj de muziko.

Iom ĝenas, ke kelkloke fuŝa prononcado aŭ misharmonioj inter la muziko kaj la teksto malhelpas la komprenon. Kie en la tekstlibreto mankas supersigno en la vorto "ŝanĝos" (dufoje en la kanto "Ĝi klasikas, mi rokemas") ni ankaŭ aŭdas "ŝanĝos". Estas domaĝe, ke la



Facilas trovi kelkajn laŭdajn vortojn: Oni tuj rimarkas, ke la muziko sonas freŝe, aktuale, moderne. La melodioj estas plejparte tre agrablaj kaj facile eniras en la memoron. La voĉoj de la gekantistoj, precipe de la kantistino Karin Russow, estas tre belaj, kaj el teknika vidpunkto la verko estas tute profesinivela, kio maloftas en Esperantujo.

Al la malpli fortaj flankoj apartenas la tekstoj. Kelkfoje, kvankam ne tro ofte, mi trovas inter furoraj german- aŭ anglalingvaj ŝlagroj iujn, kiuj min fascinas pro belaj metaforoj, netrivialaj mesaĝoj aŭ aparte trafaj priskriboj

kantistoj ne komprenas la tekstojn, kiujn ili kantas - ĝuste en nia kulturo, kiu originas el la deziro pri ĉiuhoma frateco kaj kompreno trans limojn. Sed ni ne rajtas esti tro postulemaj.

Bedaŭrinde ankaŭ la miaopinie muzike plej belan verso-paron, "kinejen la voj' / pense for de ĉi tiu mond'" en "Mia ĝu'", makulas la akcento sur la unua silabo en "kinejen". Tio malpliigas la emon kunkanti. Laŭ indikoj en la tekstkajero la kantoj estas tradukitaj el la angla, kaj laŭ mia impresado sentiĝas en ili la (daŭrigo sur paĝo 6.)

La Fondaĵo TALENTO dungus 2 pedagogojn (ĉu eksterlandajn, ĉu hungarajn) por instrui esperanton al 6-jaraj infanoj en sia Internacie fama lernejo ekde septembro 1992.

ESPERANTO-INSTRUISTO SERĈATA!

Krom la salajro ankaŭ loĝejo estas certigata! Bv. urĝe kontakti:

Fondaĵo TALENTO, pk. 102, H-2041 Budaörs, Hungario.

Organizaj demandoj

Ruslanda Esperanto-Asocio refondita!

Ĉu novtipaj e-asocioj?

Ekde februaro 1992. ankaŭ Ruslando havas sian propran Ruslandan Esperanto-Asociacion. REA organizas esperantistajn renkontojn, eldonas la monatan gazeton Ruslanda Esperantisto, efektivas korespondan instruadon kaj informadon pri esperanto. Kiel la prezidanto de REA estis elektita konata poeto, tradukisto kaj interlingvisto Nikolai Lozgaĉev.

REA volonte kunlaboros kun ĉiuj internaciaj kaj landaj asocioj, redakcioj, kulturcentroj. Kontakt-adreso por REA:
RUS-620077 Jekaterinburg-77, pk. 67, Rusio.
laŭ informoj de Aleksander Korĵenkov

La 6-an de februaro 1992. en Rusia Federacio en la urbo Jekaterinburg (eksa Sverdlovsk) kunveno de diversregionaj aktivuloj proklamis fondiĝon de Ruslanda Esperanto-Asocio, REA.

Iom pli frue en Kolomna, negranda urbo en Moskva regiono, la 10-a Landa Esperanto-Kongreso de Sovetrespublikara Esperantista Unio, SEU (fondita en 1921, pereinta en 1938, restarigita en 1989) decidis ekde nun nomi la organizon Rusia Esperantista Unio, REU. Tio okazis 27-29-an de decembro 1991. - nur du tagojn post la malhiso de la Sovetunia flago desuper la Kremlo.

Ambaŭ novbakitaj rusiaj asocioj havas dekomence diversajn startajn poziciojn. REU laŭherede tenas la mandaton de Landa Asocio de UEA, havas stabilan membraron en Ruslando, laborteamon de gvidantoj-aktivuloj, jardekajn tradiciojn, sed de alia flanko ĝi heredis la ŝarĝon de respondeco por la eraroj de SEU-pasinto. SEU estis multe kritikata pro la pasiveco, neplenumo de promesoj, malforta informa agado.

Sed ankaŭ Jekaterinburga REA ne estas absolute nova organizo - almenaŭ por ekssovetianoj. Ĝia fundamento tute klare estis la aktiva kerno de Urala E-Societo - sende-

penda de SEU regiona organizaĵo, bone konata internacie pro sia aktiva eldona agado. La radikoj de UES devenas de relative malnova idea skismo, kiu okazis en la sovetia e-movado komence de la 80-aj jaroj. Oni povus nomi ĝin "La rusa raŭmismo". Tiama generacio de junaj aktivuloj deziris krei novan - nemovadisman e-movadon. El tiu impeto naskiĝis du kulturologiaj grupoj: UNIKO (Unuigo por Novtipa Internacia Kulturo, - neteritoria, eldonas la revuon *Survoje*, la idea gvidanto estas A. Fedorov) kaj Rondo Kulturo (idea gvidanto A. Korĵenkov), la ĉefaktivuloj de ĉi lasta estis samtempe la ĉefaktivuloj de la Urala regiono. Ambaŭ defiis "fiaskigantan movadumadon" kaj koncentriĝis pri organizado de tradukologiaj, esperantologiaj, literaturologiaj seminarioj kaj establo de divers-specaj servoj por la membroj.



Aparte pure la eksperimento funkciis en Uralo, kie oni sukcesis krei la movadon en la formo de UES. La organizo, kiel tio kutime okazas pri societoj, gvidataj de la eksperimentaj ideoj, estis karakterizata per nekunlaboremo kun tradiciaj movadismaj organizaĵoj kaj malinteresiĝo pri ties funkciado, kvankam oni neniam rifuzis kunlaboron praktikan. En la periodaĵoj oni mokis la "verdan ekzaltecon", verdstelismon (kiuj estas relative fortaj en la generala sovetia movado).

Pasis preskaŭ dek jaroj. La mondrevolucio pri uzado de esperanto en Uralo ne okazis, kreskis nek kvanto, nek kvalito de la tiea averaĝa esperantistaro. Kreskis, kompreneble, la organiza sperto. Kaj jen la uralanoj faris paŝon antaŭen - por provi organizi novtipan e-movadon en pli vasta skalo.

La forta atuto de REA estas la eldon-agado. REA eldonis lastatempe plurajn titolojn

de e-libroj: *Majstro kaj Margareta* de Bulgakov, *Sveda Alumeto* de Ĉehov, relanĉis la revuon *La Ondo* kaj la informilon *Ruslanda Esperantisto*. Kontraste REU posedas nur pri la kotizoj de la membroj - kluboj kaj individuoj. La plimulto de la rusia esperantistaro malgraŭ tio ne plu preferas subteni la tradician organizon.

Ĉu tio daŭros? Ja, la vivo ŝanĝiĝis en Rusio. Nun pli da ŝancoj havas tiu, kiu sukcesas sin pli bone financi. Kiu el la du direktoj venkos? Kaj ĉu venkos? Tion montros la estonto.

Andrej Ananjin, Moskvo

La fenomeno pri REU kaj REA ne estas esceptaĵo. Similaj aferoj okazis en Polio (PSEK), Hungario (HEJ), Bulgario (Vraca), en Italio (LF-Koop) ktp. La tempo pasas, la ĉirkaŭa mondo evoluas, kaj esperantistoj, la t.n. "simplaj membroj" de e-asocioj jam ne kontentas pri la slogenoj, servoj, strukturoj deantaŭ 20-40 jaroj.

La nomo *esperantisto* por multoj ricevis novan enhavon. "Raŭmismo" por ni ne signifas la forĵeton de la tradiciaj movadaj aferoj, strukturoj, sed apude, aldone (!) al ĝi havas novajn konceptojn, ideojn.

La novtipaj organizoj klopodas transpreni la metodojn, ritmon de la ekstera mondo, kaj turnas multe pli da atento al priservo de la jamaj (!) esperantistoj (= ŝanĝo de prioritato de la propagando al la utiligo de esperanto). Tio ne signifas la forĵeton de la tradiciaj valoroj kiel historio, kulturo, valorsistemo (krom la homaranisma ideologio), sed kompletigas ĝin. En la daŭro de lastaj dek jaroj ankaŭ UEA turnas - paŝo post paŝo - multe pli da atento al la priservo de siaj membroj!

Mi forte opinias, ke ekstremaj tendencoj ne povos "venki". Ni devas adaptiĝi al la nunaj eksteraj cirkonstancoj, ni devas uzi la hodiaŭajn, modernajn sciencojn (psikologio, organiziko, marketingo ktp.), sed ni devas gardi ankaŭ la pozitivajn elementojn de la ĝisnuna strukturo! Esperanto ja ne estas simple ponto-lingvo, sed estas propra lingvo de la esperanto-komunumo.

Szilvási László, Budapeŝt

Nur financa krizo!

En la januara n-ro de Ruslanda Esperantisto (RE) aperis longa artikolo *Sub la ruĝa standardo*. Kadre de tiu teksto aperas la frazo: "Eĉ krizanta SAT havas nun pli multajn (eks)sovetianojn ol SEU..."

Mi volas per tiu ĉi noto precizigi, ke la nuna krizo de SAT estas nur financa!... De 71 jaroj SAT jam konis similajn krizojn. Ĝi ĉiam ilin superregis. Espereble ni same superregos tiun ĉi kaj la venontajn!

Ĝis revido kun ĉiuj (eks)sovetianoj en Kaunas!

Por la Plenum-Komitato de SAT

Yves Peyrat, prezidanto
Ruslanda Esperantisto, 5/92.

Kiel oni diras "Kroatio" ĉe Vi?

La nova ŝtato Kroatio sur la mapo de Eŭropo havas ne tiom facilan taskon - unue multajn homojn tra la mondo konsciigi pri sia identeco. Por helpi informi pri Kroatio ni volonte unue informiĝus pri tio, kiom oni scias ĉe vi pri nia lando. Ekz. kiel oni nomas Kroation en via lingvo?

Se vi emus pli profunde helpi al ni, aparte ni dankas, se vi ŝatus aldoni ankaŭ ekz. elĉerpaĵojn pri Kroatio el iu vialanda enciklopedio. Ne forgesu aldoni la fontindikon. Koran dankon.

Per viaj kontribuajoj ni volonte organizus ekspozicion kaj tial aparte petas vin laŭeble sendi la petitajn informojn en ekspoziciebla koverto. Nia adreso: Internacia Kultura Servo, IKS, pp. 499, HR-41000 Zagreb, Kroatio.

laŭ Letero El Zagreb, 3/92.

Esperanto fako en Samarkanda Muzeo

La Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco (fondita laŭ la iniciato de lokaj esperantistoj) en la antikva 2500-jara Samarkando disponas nun pri pli ol 15.000 diversspecaj ekspoziciaĵoj (afiŝoj, pentraĵoj, libroj, revuoj, insignoj, filmoj, artaĵoj k.t.p.) el pli ol 100 landoj de ĉiuj mondopartoj pri la universalaj homoj valoroj kaj la vivgravaj globskalaj problemoj, kiujn nun frontas la homaro. Aparta muzea sekcio traktas la rolon de la esperantomovado en la interkompreniĝo kaj proksimiĝo de diverslandaj popoloj. La muzeo estas registrita ĉe pluraj internaciaj organizoj eĉ ĉe UN kaj UNESCO. Por pliriĉigi la esperantan fakon estas bonvena ajna helpo kaj kontribuo. Pliaj informoj ĉe: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco, Anatolo Ionesov, Pk. 76, Samarkand, 703000, Uzbekistano.

El la Foruma notlibro

En Kaunas (28.09-05.10.1991) okazis la Dua Eŭropa Esperanto-Forumo. La Forumon kunaranĝis UEA kaj Litova Esperanto Asocio, por analizi la aktualan situacion de la movado, kaj preparoli la eventualajn pluajn paŝojn. Litova E-Asocio invitis - senpage - partopreni ĉiujn landajn asociojn, sed nur duon-manpleno sendis siajn reprezentantojn. Estas timiga la konkludo, ke eble la aliajn asociojn ne interesas la Eŭroprivele kunlaboro. Pri la Forumo aperis dekoj da artikoloj, sed ni trovis nur unu, kiu enhavis arkaŭ konkretajn...

Kolektiĝis centoj da esperantistoj, ĉefe el la meza kaj orienta partoj (!) de Eŭropo. La okcidentan parton reprezentis vicprezidantoj de UEA Ulrich Lins kaj Roman Dobrzynski, ĝenerala sekretario Oszkár Princz, Brunetto Cassini el Italio, kelkaj e-istoj hazarde restantaj en Litovio.

La partoprenantojn salutas la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio (LEA) Algis Skupas, kelkaj gastoj, telegrame Eŭropa Parlamento.

R. Dobrzynski: UEA kiel unua rekonis la sendependecon de la baltaj landoj. La mondon karakterizas integriĝo kaj sennaciecaj tendencoj. Eksplozivas naciaj movadoj, kio ne estas regreso, sed progreso. Tio estas nova ŝanco por esperanto kaj montras, ke oni povas interkompreniĝi.

S. Kuznecov: esperas, ke disiĝon de nacioj sekvos unuigo.

Raportoj pri la situacio kaj agado:

J. Ojalo: La dua krizo en la movado post la 60aj jaroj, kiam la Komunista Partio akre atakis e-on. 300 kolektivaj kaj individuaj membroj. Radio-elsendoj kaj diversa agado.

Ukrainio: Du asocioj, UkrEA havas 400 membrojn en 23 kluboj. La alia asocio estas malgranda.

A. Ananjin (SEU): SEU havas 300 individuajn membrojn en 13 sovetaj respublikoj, ĉefe junularo. SEU ludas rolon de UEA por Sovet-Unio.

Halina Gorecka (Urala Esperanto-Societo): Al la societo apartenas 150 individuaj membroj; okazas vigla kultura, literatura, eldona agadoj, koresponda kurso estas enspeziga; kun SEU la societo havas informajn rilatojn.

Paŭlo Jegorovas: LEA havas 400 individuajn membrojn kaj 27 lokajn klubojn, duĉambbran kontoron, 3,5 salajratajn oficistojn; eldonas "Litova Stelo" presatan senpage. Esperanto estas instruata en kelkaj lernejoj kaj per koresponda kurso. Ĉiujare LEA organizas almenaŭ unu internacian aranĝon. En 1992 okazos SAT-kongreso por proksimume 1000 partoprenantojn.

Lech Kosieniak (Pollando): La membraro reduktiĝis de 20.000 al 8.000. Ŝtata subvencio forestas. Financaj malfacilaĵoj: al UEA pagataj 200 asociaj membroj. Pri Zamenhof-Centro: "Malaperis komunismo, malaperis la ŝtata subteno." La placo restis, usona komerca firmao aĉetas parton de la placo. Intenco de la fonduso - aĉeti renovigendajn konstruaĵojn por la E-centro.

Andrzej Grzebowski: "Esperantotur" funkcias kontentige, strebadas al kvalito anstataŭ kvanto de turistoj; edukas turistgvidantojn por ĉiuj kunlaborantaj landoj kaj itineroj, ankaŭ por baltaj landoj.

Ulrich Lins (Germanio): GEA havas 2.000 membrojn, junulara agado pli aktivas, estas subtenata de la Ministerio de junularaj aferoj. Stagno de la 70aj jaroj pasis. Komuna E-Centro en Bonn.

B. Casisni (Italio): Itala E-Federacio havas 1.300 membrojn, pliaktivas la junularo.

Kongresoj okazas en la itala lingvo. Elstaras la eldona agado: "Literatura Foiro", "Edi-studio".

O. Princz, Sándor Jakab (Hungario): La membraro (7.200) ne malkreskis. Subteno de sindikatoj forfalis: anstataŭ la antaŭaj 15 dungitoj nun 4. Eldonado provizore ĉesis, libro-stoko restis en valoro de kvin milionoj da forintoj. E-o en lernejoj egalrajtas al aliaj fremdlingvoj, ĝi estas instruata en proks. 150 bazlernejoj al 2.000 lernantoj, al 250 mezlernejoj kaj 70 studentoj.

*

R. Dobrzynski

Lingvopolitiko de e-movado en unuiginta Eŭropo

Okazis io tre grava: kompleta detruo de la ekzistanta ordo en

Eŭropo sen milito. Neniam antaŭe io ŝanĝiĝis sen forto. (Konsideratas la Viena Kongreso 1814/15, Versailles 1919/20, Jalta 1945).

Kies potenco aperos? Ĉu USA superos la mondon kiel centro? Rolo de Japanio, Ĉinio? Okcidenta Eŭropo bezonas Orientan Eŭropon por sia graveco. Naciismo estas la motoro. La limo inter Okcidento kaj Oriento ŝoviĝas Orienten - pace; ĉu ĝi tute foriĝos?

Disvastiĝas la homaj rajtoj, valoro de e-o kreskas. Disvastiĝo de e-o, bezonatas iom da libero kaj iom da manĝo.



A. Grzebowski (furioze): La limo ne ŝoviĝis orienten. Kontraŭe! Ni devis pasigi multajn horojn sur la sovetia limo en malhomecaj kondiĉoj por trafi en Litovion.

U. Lins: malfacile estis atingi Litovion. Necesas nia rezolucio pri landlimaj problemoj.

B. Cassini: Politiko unuigas, ekonomio disiĝas Eŭropon.

S. Kuznecov: Ĉu komunismo fiaskis? Fiaskis nur kelkaj teoriaj ideoj. Ne ekzistu iuj ŝtataj lingvoj. E-o estas la sola neŝtata lingvo, ĝi nuligas limojn inter homoj. E-o estas la simbolo kaj bazo por unuigo de Eŭropo.

*

Oszkár Princz

Kunlaboro de e-organizaĵoj en Eŭropo

Gravas: kial kunlabori, kiuj kunlaboru, kiel kunlabori. Dume okazis regionaj kunlaboroj, - konsultiĝoj ktp. La celo: produkti valorojn: vortaroj, bibliografioj, varoj.

Necesas enigi esperanton en la produktad-procezon de makrosistemo: en Hungario, ekzemple, e-o en lernejoj samrajtas al aliaj lingvoj.

J. Ojalo: En lernejoj "lernado do lingvoj (ankaŭ esperanto) por forgeso"! Interesatoj pri la problemoj de instruado de e-o en lernejoj pridiskutu la demandojn pli detale.

(Troviĝis deko de interesitoj, sed la diskutado ne okazis.)

L. Kosieniak proponas eldonadon de komunaj revuoj.

*

Ulrich Lins

Kontribuo de UEA al kunlaboro de eŭropaj e-asocioj

UEA dependas de la individuaj membroj. Rolo de orientaj e-istoj malgrandas, sed UEA ne neglektis ilin, ĉar en orientaj landoj estas granda aktivado. Nun falas la muroj inter landoj de oriento kaj okcidento, komenciĝis amasa vojaĝo el oriento (UK en Kubo, Bergen). UK en Prago forfalis. En Vieno gravas la loĝiga problemoj - mankas malaltkostaj loĝejoj. UEA ne plu povas akcepti rublojn (de 300 ind. membroj - J.O.), solvo de la membrkotiza problemoj dume nesolvitas. UEA ne povas aktive partopreni ekonomian agadon...

L. Kosieniak: atentigas, ke UKoj en orientaj landoj estis pli amase partoprenataj. UEA fiksu por landaj asocioj konkretan kotizon. PEA kapablas pagi nur por 200 membroj anstataŭ 8.000.

A. Ananjin: Ĉu en Vieno UK por ĉiuj e-istoj, aŭ bankedo de riĉuloj? Kiel pagi la kotizon de UEA?

U. Lins: Ĉiuj agadaroj de UEA finiĝis kun deficiito.

E. Laiconas: Necesas serĉi eblojn por ricevi valuton: fari insignojn, eldoni librojn, akcepti turistojn por valuto.

R. Saag: Surloke ekzisto de UEA ne sentiĝas. UEA havigu lernilojn kun rajto de lokaj organizaĵoj ilin multobligi (sonbendoj, diafilmoj), kreu fonduson por helpi al baltaj landoj. Bezonatas multobligiloj.

J. Ojalo: E-libroj disvastiĝas malbone. La plejmulto de e-istoj ne scias pri apero kaj aĉet-

eblo de la libroj. UEA organizu "servon de libroservoj", kiu ricevu eldonplanojn de e-eldonejoj kaj informu landajn libroservojn por antaŭmendo de eldonotaĵoj.

A. Grzebowski: Libroservo estas sensencaĵo. Oni ne interesiĝas pri libroj. Ne eblas eldonado, ĉar la minimuma preskvanto estu 10.000 ekz. por ke la prezo estu al e-istoj akceptebla.

J. Ojalo: S-ro Jegorovas, ĉu vi scias la eldonkvanton de Edistudio-libroj?

P. Jegorovas: Du mil. Unu mil por LEA, unu por la eldonejo mem.

J. Ojalo: Do eblas eldoni E-librojn ankaŭ nun.

Respondoj de U. Lins - la lasta ĉeestanta UEA-representanto - pro ankaŭ lia forveturo restis nericevitaj.

*

La forumo "velkis" por la lastaj du tagoj. Mankis rezolucio kaj ĝiaj akceptuntoj. La forumo havis informan karakteron, sed ankaŭ kiel tia ĝi havas valoron.

J. Ojalo

laŭ Informilo de EAE, 6/91.

Batalo por imagita potenco - kio ne ekzistas...

UkrEA sen prezidanto

La 21-22an de marto en Kievo okazis la 3a kongreso de la Ukraina E-Asocio, UkrEA. Partoprenis 62 personoj, el kiuj 36 kun voĉdonrajto. La kongreson kronis neordinara evento pri la elekto de prezidanto.

Por la ofico de la prezidanto de UkrEA pretendis Je. Kovtonjuk kaj D. Cibulevskij. El 36 voĉdonintoj 18 preferis Cibulevskij kaj 17 Kovtonjuk, tial je unuvoĉa distanco prezidantiĝis Cibulevskij.

Tamen - post elekto de la tuta estraro, kaj disdono de la funkcioj, okazintaj per komuna interkonsento, fine de la kongreso unu membro de la tripersona kalkulkomisiono anoncis, ke la voĉoj estis miskalkulitaj, kaj Kovtonjuk devas havi 18 kaj Cibulevskij 17

Ĉu sakstrato?.. Skandalo?.. Aŭ plia atentigo, ke ni ne evitu zorgi pri la formala aspekto de niaj aranĝoj? Estas nur bedaŭrinde, ke la esperantistoj (tiom nemultaj!) disipas la tempon kaj energion batalante por la influo kaj potenco, kiuj ... ne ekzistas...

*Laŭ Ruslanda Esperantisto 4/92,
kaj E-Centro Informas 1,2,3/92.*

voĉojn. Por ripeta balotado mankis tempo kaj kvorumo (paro de delegitoj jam forveturis). Post longa diskuto, neglektinte la rekomendon de la novelektita prezidanto, la kongreso decidis kolekti ĝis junio la voĉdonilojn perpoŝte, kaj tiel trovi la novan prezidanton.

La kverelo daŭris eĉ post la kongreso. Kelkaj juras pri senerara kalkulo (rezulton de la voĉdonado akceptis ankaŭ la posta reklamacianto), aliaj akuzas pri intenca manipulado... Unu post la alia aperas la leteroj en la gazeto *E-Centro Informas*.

D. Cibulevskij pro la malfido de membroj kaj de la kongreso deklaris sian demision el la prezidanta posteno kaj de sia membreco en la Konsilio (= estraro) de UkrEA. Ne plu okupiĝante pri tiaj diskutoj li daŭrigas sian laboron kiel la ĉefdelegito de UEA kaj SAT-peranto por Ukrainio.

Alvoko!

Alvoko al estigo de fonduso

Tragedio de l' homo "Expo-opero"

Hungara kaj aŭstra esperanto-asocioj - laŭ ideo de Imre Nehéz - tiamaniere anoncas estigon de fonduso de opero *Tragedio de l'Homo*.

Ili petas la aliĝon de tiuj, kiuj la sekvajn pensojn akceptas kaj tion subtenus:

- » La celo de fonduso estas: estigi financon bazon por komponigo de esperantlingva opero el la verkaĵo *Tragedio de l'homo* de Imre Madáchi - en kadro de internacia konkurso - kaj prezenti la operon okaze de EXPO '96 en Hungario.
- » La opero, verkota el la tragedio kaj ĝia eventuala prezento samtempe en Budapeŝto kaj en Vieno laŭ nia opinio povas simboli ponton, bazpensojn esprimanta la mondan kulturon.
- » Ni esperas, ke la EXPO-ponto, kiu jam ŝajnis perdiĝanta, pere de la muziko tamen efektiviĝas, kaj anoncas, ke la kulturo kapablas ellevi kaj kunigi la homojn kaj regionojn, kiuj volas unuiĝi.

Helpu la efektiviĝon de tiu celo: indiku vian konsentan intencon kaj vian oferdonon al nia organiza oficejo.

Nia adreso: p.k. 250, H-8500 Pápa, Hungario.

Vi povas ankaŭ helpi, se vi inter viaj geamikoj, en via laborejo alvokas la atenton de tiuj homoj, kiuj povas helpi aŭ subteni nian fonduson.

Ni petas la kunlaborantojn de televido, radioj, presoj, ke laŭ siaj eblecoj helpu nian alvokon, por ke pli multaj ekkonu ĝin.

Rim: La unua subtenanto estis la urba estraro de Pápa per 10 mil. forintoj. (La red.)

Proksimaj limdatoj

En julio:

- 15-24. Naturamika Renkonto, IREN, Abaliget.
- 18-14. E-konferenco de OSIEK, Ateno.
- 18-25. Komuna Kristana Kongreso, Vence, (Hungario)
- 19-25. Antaŭkongreso de UK, Prago.
- 25-01. UK, Vieno.

En aŭgusto:

- 01-08. Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, Óriszentpéter.
- 01-08. Int. Skolta Tendaro, Kremnica.
- 01-07. Int. Konferenco de ILEI, Bratislavo.
- 02-09. IJK, Montrealo.
- 03-09. Int. Junulara Semajno, IJS, Esztergom.
- 05-15. SAT-Kongreso, Kaunas.

Aranĝoj


Somera Esperanto-Biciklado

Se vi havas funkciantan biciklon, tendon kaj emon, biciklante ekkoni la nordorienton de Germanio, jen estas ideala okazo por vi: partoprenu ĉi tiun tradicion someran bicikladon. Ĝi komenciĝos la 25-an de julio en Rollwitz ĉe Pasewalk kaj finiĝos la 8-an de aŭgusto en Thomsdorf.

Kunportu riparilojn por la bicikloj, tendon kaj laŭeble kuirilon, krome iom da mono por surloke pagendaj kotizoj por tendumado kaj por manĝaĵoj. Plej grave: ne forgesu la bonan humoron!

Mallongaj distancoj, sufiĉe da tempo por manĝi glaciaĵojn, naĝi en la lagoj kaj viziti vidindaĵojn! Aliĝu ĉe:

*Katrin Bormann,
Wiesenweg 4, DO-2101 Rollwitz
GEJ-gazeto 3/92.*



Arta ekspozicio

Mi volas komuniki, ke dum la UK okazos ekspozicio de miaj glas- kaj oleopentraĵoj. La ekspozicio dum la tuta semajno havos lokon apud la centra libroservo.

Mi invitas perede nia gazeto Eventoj ĉiujn gekongresanojn por viziti ĝin.

Esperante renkonti multajn legantojn,
*Janusz St. Andrasz
Ligota Górna 72,
PL-46200 Kluczbork, Polio*

MEJS Mez-Eŭropa Junulara Semajno 9.8. - 16.8. 1992 en Olomouc (Ĉeĥoslovakio)



ĈU KOMUNA LINGVO SUFIĈAS? - MEZEŬROPO PREZENTAS SIN

MezEŭropa Junulara Semajno!

Pasintjare la partoprenantaj Landaj Sekcioj de TEJO en la Mez-Eŭropa Junulara Konsultiĝo (Germanio, Hungario, Italio, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, Polio, Svisio) decidis aranĝi komunan renkontiĝon: MEJS.

Tempo: Ĉu komuna lingvo sufiĉas?

Loko: Olomouc, Ĉeĥoslovakio.

Dato: Tuj post IJS en Hungario, t.e. de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto.

Kotizo: depende de la aĝo kaj lando inter 110 kaj 240 DEM.

Estas preparata abunda kaj varia programo, de la seriozaj prelegoj, diskutoj, sinprezentoj de TEJO-sekcioj ĝis la malpli seriozaj ludoj, ekskursoj, rokmuzika kaj orgena koncerto, ktp.

Por pliaj informoj vi povas uzi la telefonon: +42-68-208462, kaj petu aliĝilon de:

*Studentcentrum Esperanto, Krizkovského 14,
CS-77200 Olomouc.*

INTERAMIK' - 1!



Internacia renkontiĝo apud Kievo, la ĉefurbo de Ukrainio!

Dato: inter la 22a kaj 28a de aŭgusto!

Pliaj detaloj en la sekva numero!

Novaj sonoj en rokmuziko

(daŭrigo de la 1a paĝo)

facileco verki tekstojn en la angla, kie hegemonia unusilabaj vortoj, kaj la malfacileco traduki la rezulton esperanten. Ekzemple la verso "Ŝi - klasiko, mi - nur rok" aspektas kiel stumbligo de la angla "She likes classics, I like rock".

Ne eblas juste recenzi la kasedon kaj kompaktdiskon sen menciigi ilian ĉefan celon, nome diskonigi esperanton al la "ekstera mondo". Mi ne certas, ĉu por tiu celo ili principe pli bone taŭgas ol la kasedoj "Ora Team" aŭ la jam menciita "baF", sed dank' al la admirinda engaĝiĝo de la iniciatinto, Gunter Koch, jam videblas granda sukceso. Ekzemple mi hazarde trovis en mia regiona gazeto kvarkolumnan raporton pri la projekto, kaj "Tutmonda Muziko" eĉ jam aperis dum kvaronhoron en elsendo de privata televidstacio, postlasante, laŭ juĝo de spektintoj, bonan impreson pri si kaj pri esperanto.

Mi kore deziras al ili pliajn sukcesojn kaj gojus, se multaj esperantistoj subtenus la projekton per aĉeto kaj diskonigo de la kasedo kaj kompaktdisko, eldonitaj en 5.000 respektive 1.000 ekzempleroj.

Ulrich Matthias
el *Koncize*, 1992/3



... Tutkore mi rekomendas...

...La novan pop-muzikon mi jam konas, dum PSI (Printempa Semajno Internacia) mi aĉetis de s-ro Koch (policisto) la belan, elegantan CD-diskon kun pop-muziko kaj kantoj. Jam plurfoje mi reaŭskultis ĝin en mia hejmo, kaj mi eĉ diri ne bezonas, ĉiam kun vera plezuro. La traduko de pastro Burkhardt precipe plaĉas al mi ĉu pro la enhavo, ĉu pro la ĉarma, impona melodio! En la tekstoj de aliaj kantoj aperas kelkfoje eraretoj, sed la bela muziko de Rainer Conrad pardonigas ĝin. Mi povas tutkore rekomendi la diskon al ĉiuj esperantistoj!

Dr. Josef Kondor, Germanio

**ESPERANTA
SONKASEDO
SEN PAGO!**

Alvokon vidu sur la suplementa paĝo!

Jadwiga Gibczynska

Teatro de unu aktoro

Jadwiga Gibczynska, profesia aktorino el Krakovo (Polio), aktivas precipe kiel aktorino, krom tio al multaj prezentataj artaĵoj ŝi kontribuas ankaŭ per verkado, traduko, adapto kaj reĝisorado. La teatraĵojn, apartenatajn al la t.n. "Teatro de unu aktoro" ŝi prezentis en ĉiuj pli grandaj Esperanto-medioj en Polio, en diversaj Universalaĵ Kongresoj (Budapeŝto, Kopenhago, Lucerno, Vankuvero, Varsovio), ankaŭ plenumis artvojaĝojn tra Britio, Danio, Norvegio, Svedio, Bulgario, Hispanio, Italio, Jugoslavio kaj Japanio.

Aldone al teatra aktiveco, ŝi okupiĝas ankaŭ pri la instruado de Esperanto laŭ rekta, natura metodo.

Ŝia repertuaro enhavas naŭ titolojn:

1. Finn Methling: Vojaĝo al verdaj ombroj (dramo pri la sorto de virino ekde infanaĝo ĝis la morto en maljunaĝo trad. J. Toczyski);
2. Maria Curie (biografia prezentaĵo de la fama Nobel-premiita sciencistino Maria Skłodowska-Curie, surbaze de memuaroj, leteroj, k.s.);
3. Boleslaw Lesmian: Slavaj fabeloj (trad. Lidia Ligeza);
4. J. Gibczynska: Zamenhof (pere de la monologoj de la patrino Rozalia, la edzino Klara kaj la filino Lidia, oni vidas la vivon de Zamenhof);
5. Karol Wojtyła: Signaloj (fragm. el "Antaŭ vendejo de la juvelisto" trad. T. Tyblewski);

Mallonge

NEJ (Nederlanda Esperanto-Junularo) havas novan estraron. Poŝtaĵoj estas atendataj ĉe la sekretario (Cora Brink, postsekvanto de Mariken Creuwels):

Cora Brink,
Beatrixstraat 36
NL-7511 KL Enschede, Nederlando.
Tel.: +31-53-310796

La interlernejan esperantan lingvokonkurson (vidu *EVENTOJ* nro. 2.) por la studjaro 91/92 gajnis Jozefo Tabajdi, u. Kiskunhalas (kategorio: komencantoj); kaj Krisztián Halász (kategorio: progresantoj). Ilian laboron HEJ (Hungara Esperanto-Junularo) premias per senpaga partopreno en IJS, la aliaj 5-5 plej-sukcesintaj ricevas premion de la "Fondaĵo Esperanto, Budapeŝto".

Rim. La konkurso ekde septembro estos internacia! Bv. relegi pri tio la artikolon en Eventoj nro. 2!

La Centro "Esperanto" en Kievo, Ukrainio pro la nefidindeco de servo en la ĉefa poŝtejo ne plu uzas la telefaksan numeron +7-044-2287272. Bv. uzi nur la kutiman poŝtan adreson:

Lineckij Mihail,
254200 Kievo-200, alĵa 539/1,
aŭ la telefonon +7-044-4328777.

6. J. Gibczynska: Ludilo de dioj (monologo de Sapho, fama poetino de la amo, kiu vivis en Lesbos en la VI jc. a. K.);

7. La febla sekso (kompilaĵo de distraĵoj monologoj de virinoj);

8. Gudrun Pausewang: Ĉu la nepoj nin benos? (fikcia rakonto, kreita surbaze de la "La lastaj infanoj de Oldrovalo", esperantigita de J. Giesner, pri la danĝero de la atoma milito);



LUDILO DE DIOJ

9. Salwomir Mrozek: La Falanto (tragikomedio post la kosma katastrofo, kiam ĉio falas ... eĉ la raportanto).

Kaj aktuale prilaborata estas "La bela indiferentulo" de Jean Costeau.

Kontaktadreso: Jadwiga Gibczynska
Os. 1000-lecia 7 m. 89. Tel.: +48-12-481430
PL-31-604 Krakow, Polio.

En majo aperis la libro "Survoje al Internacio de Proleta Esperantistaro" de Adolf Schwarz, Germanio. La legantoj povas trovi en ĝi dokumentitajn faktojn kaj eventojn, kaj povas konatiĝi kun la historio de la laborista e-movado. "La libro povas esti interesa legaĵo por ĉiuj, ne nur por historiistoj kaj specialistoj."



La 223 paĝa libro estas mendebla ĉe Ljuben Grozdanov, ul. Ars. Jovkov 3/3, BG-1309 Sofia, Bulgario. Prezo: 11 USD aŭ egalvaloro.

folioj de Mondsindikatisoj, majo-'92.

Ontaria Esperanto-Kongreso

La kvara Ontaria Esperanto-Kongreso sukcese pasis inter 15-18 de majo, kaj ĝin partoprenis 61% de la membraro.

Dum la ĝenerala kunveno de Ontaria Esperanto-Asocio estas starigita la fondaĵo "Ohigin". (Dum sia vivo Lorkono Ohigina (1910-1986) sindone dediĉis sin al esperanto, ne hezitante donaci relative grandajn monsumojn por helpi aktivulojn partopreni E-renkontiĝojn.) Pliaj detaloj:

Ontaria Esperanto-Asocio,
Pk. 80, filio B, Ottawa ON, Kanadio K1P 6C3.

Piratoj en Esperantio

(daŭrigo de la 1a paĝo)

Cetere, mi perletere sciigis Sekelj, ke pro la konstanta vegetado de EVA, mi ne plu deziras esti membro. Tiam Sekelj subite vekigis kaj, ignorante mian eksigon, publikigis artikolon en Heroldo de Esperanto, en kiu li anoncis la starigon de nova komisiono de EVA pri piratado kaj nomumis min komisionano. Farante tion li agis senrespondece, ĉar li ne demandis min private, ĉu mi emas entrepreni tiun taskon.

La rezulto estas, ke ĝis nun EVA faris neion por defendi esperantistajn aŭtorojn kaj eldonejojn kontraŭ la plago de piratado. Se EVA nuntempe, kun nova prezidanto kaj novaj komitatoj ne volas okupiĝi pri unu el la manieroj plibonigi la profesion statuson de verkistoj, ĉu ĝi vere povas pravigi sian ekziston?

Bernard GOLDEN
 Damjanich u. 1/C. I/8.
 H-8200 Veszprém, Hungario

Intaŭ ĉ. 2 monatoj la manuskripto de la supra artikolo estis sendita al la prezidanto kaj al la sekretario al EVA, por doni la ŝancon reagi en la sama numero. Ĝis nun nek unu vorto alvenis...

La piratado, kaj nerespekto de aŭtoraj rajtoj (inkluzive la kasedajn kopiraĵojn) en nia komunumo estas ege ĝena kaj viva problemo. Estas ĝuste la verkistoj, la membroj de EVA, kiuj devus zorgi pri projekto de la intereso de aŭtoroj. Ni volonte helpus, sed kion ni faru, se eĉ la estraranoj de EVA ne respondas...

László Szilvási

La Fondaĵo TALENTO dungus 7 pedagogojn por instrui esperanton al 6 jaraĵ infanoj en sia internacie fama lernejo ekde septembro 1992.

ESPERANTO INSTRUISTO SERĈATA!

Krom la salajro ankaŭ loĝejo estas certigata!

Ev. urĝe kontakti:

Fondaĵo TALENTO,
 pk. 102, H-2041 Budaörs, Hungario.
 Telefonoj: +36-1-1733454 kaj 1896992.



**Ĉu
 Vi
 jam
 aliĝis?**

EVENTOJ, eszperantó nyelvű információs lap.
 Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:
 H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.
 Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELLER.

Készült az M & M nyomdában:
 H-1181 Budapest, Bercsényi u. 10.

EVENTOJ, dumemajna gazeto pri la esperanto-movado.
 Eldonas Kultura Esperanto-Asocio
 kaj LINGVO-Studio, Budapeŝt.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
 La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondacas pri la anonc-enhavo.

Esperanto en radio

Skribu al Radio Vieno!

Lige al la Universala Kongreso, la decidaj organoj baldaŭ mezuros la popularecon kaj efikecon de la esperanto elsendoj de Radio ORF Vieno. Estas urĝe bezonataj viaj alskriboj al la redakcio, por helpi en pluvivo (!) de la internaci-lingvaj elsendoj!

Por ne skribi vane, la redakcio ofertas al vi ĉ. 20 diversajn broŝurojn en esperanto. Por ricevi ilin, estas necesa nur via alskribo. Gravas ne mono, sed la kvanto de via alskribo!

La liston de tiuj eldonaĵoj vi povas aŭdi en la elsendoj, aŭ vi povas peti ilin. Inter la broŝuroj estas pluraj, por ricevi kiujn estas necese 2 aŭ 3 aŭ 4 viaj alskriboj! Ne estas akceptata alia esperantaĵo por interŝanĝo, ĉar temas pri kreskigo de korespondaĵo. Viaj leteroj estas tre bonvenaj. Ni petas, helpu ĝis tio eblas!

Adreso:

ORF, Radio Aŭstrio,
 Esperanto-redakcio, A-1136 Vieno.

Parolas Varsovio

La novan jaron ni eniris kun malpli granda elsendotempo. Sed tamen ni ĝoju, ke la Pola Radio decidis konservi programojn en esperanto. Pasintjare oni rezignis pri la arabaj, danaj kaj hispanaj, nunjare ne plu aŭdiĝos elsendoj en la franca, itala, finna kaj sveda lingvoj.

Iom da statistiko pri la ricevitaj korespondaĵoj en 1991:

1. Germanio - 544 leteroj,
2. Ĉeĥoslovakio - 510,
3. Nederlando - 384,
4. Litovio - 286,
5. Latvio - 277,
6. Svedio - 207,
7. Britio - 140,
8. Francio - 135,
9. Finnlando - 114,
10. Estonio - 107.

Lingvo

Ĉu "mallongondo" aŭ ĉu "kurtendo"?

Antaŭ ĉio mi emfazas, ke mia opinio la pli ol cent-jara, komence artefarita esperanto jam estas plenkreska, vivanta lingvo, kiun ĝiaj uzantoj devas respekti kia ĝi estas, kun ĝiaj malperfektaĵoj.

Esperanto havas 3 gravajn malperfektaĵojn, kiuj - krom aliaj kaŭzoj - malfavore influis ĝian disvastiĝon:

- la neuzo de la tuta latina literstoko kaj uzo de ĉapelitaj literoj;
- sufiksformaj vortradikelementoj en la vortaro (dosiero, komparo, uzino...);
- la ekskluziva uzo de mal-vortoj.

Kio koncernas speciale la ekuzon de "kurta", mi vidas nenian problemon. Ĉi vorto enestas en la Plena Ilustrita Vortaro - ankoraŭ kiel neologismo - ĝi estas taŭga, ĉar internacie konata, 2-silaba. Kio koncernas la vorton


Esperantistoj el ceteraj landoj sendis malpli multajn leterojn.

Horaro

(laŭ mez-eŭropa tempo)

15.30 - 16.00 en frekvencoj 9.525, 7.285, 7.145, 6.135, 6.095 kHz en kurtendo, kaj 1.503 kHz en meza ondo, resp. 31.50, 41.41.18, 41.99, 48.90, 49.22 metra ondolongo en kurtendo kaj 200 m en meza ondo.

22.30 - 23.00 en frekvencoj 7.285, 7.145, 6.135, 6.095 kHz en kurtendo, kaj 1.503 kHz en meza ondo, resp. 41.18, 41.99, 48.90, 49.22 metra ondolongo en kurtendo kaj 200 m en mezonda bendo.



Ni atendas viajn raportojn pri la aŭdebleco kaj funkciado de la unuopaj frekvencoj. Tio tre helpos nin en niaj estontaj postuloj ĉe la teknika sekcio.

Kelkaj konstantaj programeroj

- » lunde: salutoj kaj bondeziroj kun muziko;
- » marde: kion skribas e-gazetaro;
- » merkrede: Polio hodiaŭ;
- » ĵaŭde: kulturmagazino;
- » vendrede:raportoj pri e-arangoj, intervjuoj kun diverslandaj esperantistoj;
- » dimanĉe: esperanto-ekspreso.

Viajn leterojn atendas:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio,
 PL-00950, Varsovio pk. 46, Polio.
 Telefakso: +48-22-444123.

Andrzej Pettyn
 laŭ Ruslanda Esperantisto 3/92.

"leŝta" anstataŭ maldekstra, tio ŝajnas al mi pli problemeca. Ĝi ne troviĝas nek en PIV, nek en ties Suplemento. Anstataŭ maldekstra mi trovis la latindevenan vorton sinistra, sed ĉefe en figurativa senco. Krome ĝi estas 3-silaba, kaj eble pro tio ĉi vorto ne disvastiĝis.

Cetere se estas samsenca adjektive uzebila sufikso, mi prefere evitas la mal-vortojn (eta, aĉa anstataŭ malgranda, malbona). Mi apogus la pli oftan uzadon - ne nur en la poezio - de kelkaj bazaj mal-vort-anstataŭaj neologismoj kaj mi aprobus post ilia ĝeneraligo la oficialigon, kiel ekzemple frida, dura, basa anstataŭ malvarma, malmola, malalta, ĉar tiuj vortoj estas sendube ĝenerale konataj, internaciaj. Aliaj neologismoj ne estas tiom ĝenerale konataj (turpa = malbela), aŭ ne estas unusencaj (minca = maldika aŭ mallarĝa).

Kiel dirite estante esperanto vivanta lingvo nur la lingvouzo povas decidi. La enradikiĝo de apartaj malaj vortoj anstataŭ mal-vortoj povas okazi nur per ofta uzado, paŝon post paŝo, lan- te (malrapide), kiel ni spertas ĉe novaj esprimoj en naciaj lingvoj.

Mihály Molnár
 laŭ la materialoj de Radio Vieno

Anoncetoj

Juna amiko! Post la transiro al nova eldonisto (ILEI) kaj presejo, la unua numero de Juna amiko por 1992. aperis komence de majo. La hungara gazet-distribua kompanio HELIR ne plu peras ĝin. Reform-eŭropanoj volantaj aboni, kaj povantaj pagi forinte bv. turni sin al la hungara ILEI-sekcio (Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest, Hungario). Jarabono: 120 HUF en Hungario, 250 HUF en la cetera "reform-eŭropo", 12 NLG ĉe UEA.

Mi serĉas geesperantistojn kies gepatra lingvo estas iu el la sekvaj lingvoj: greka, araba, ĉina, japana, itala, hebrea. Mi bezonus iom da tradukan helpon!

Bajáki Imre
H-6100 Kiskunfélegyháza,
Dr. Holló L. u. 61. Hungario.

Nia kultura klubo decidis ekde nun ĝis la fino de la jaro 1993 flegi kulturajn interŝanĝojn kun Hungario: ni intencas detale studi ĉiujn gravajn punktojn el tiu riĉa kulturo: literaturo, muziko, geografio, ekonomio, homoj kaj kutimoj...

Tiele ni esperas starigi belan ekspozicion por niaj enloĝantoj, fine de la proksima jaro. Ni tre ŝatus trovi helpon kaj amikecon por reciproka kultura agado, kaj se eblos, vojaĝi al Hungario en la sekva jaro. Korespondi per lettere eble estas la unua paŝo. Niaj klubanoj estas inter 30 kaj 40 jaroj.

Ĉu vi deziras partopreni niajn aranĝojn, kaj nin helpi por starigi interŝanĝon inter Francio kaj Hungario? Do, bv. skribi al:

Esperanto Kultura Klubo,
CENTRE SOCIAL,
1 rue Paul Vaillant Couturier,
F-58160 Imphy, Francio.

Por ricevi senpagan adresaron de pli ol 350 Vienaj hoteloj, pensonj, gastejoj ktp. skribu al "Vienna Tourist Board, A-1025 Vienna". La kajero enhavas krom la nomoj kaj adresoj ankaŭ la servo-liston kaj la prezojn!

Por via notlibro

Esperantlingva Verkista Asocio (EVA)

Adreso: p/a sekretario Willem Verloren van Themaat, Volkerakstraat 38-I, NL-1078 XT Amsterdam, Nederlando.

Celoj:

- » Kunligi la verkistojn, esperanto-tradukistojn kaj eldonistojn de esperantlingvaj verkoj;
- » plibonigi la profesion statuson de verkistoj;
- » plifortigi la kontakton inter verkistoj kaj legantoj;
- » konatigi la esperantan literaturon en ne-esperantistaj medioj.

Korespondi deziras

Ducent miaj gelernantoj serĉas esperantajn geamikojn en la tuta mondo. La aĝo de ili estas 10-13 jaroj. Leterojn tre atendas la instruistino: Jadwiga Chmielewska, PL-25956 Kielce-11, pk. 3, Polio.

20 jara studento deziras korespondi kun junulinoj el la tuta mondo, speciale el la eksocialismaj orient-eŭropaj landoj. Otmar Liebhart, Schöngasse 1, A-6170 Zirl, Aŭstrio.

17 jara lernantino serĉas korespondajn partnerojn ĉefe el Afriko, Usono, Japanio, interesiĝante pri muziko, naturo, libroj, biologio kaj literaturo. Krisztina Péntes, H-2132 Göd, Erzsébet u. 28, Hungario.

Historio

Kiam, kial, kiel mi lernis Esperanton?

En 1907 mi konatiĝis kun la nomo. Neniu povis doni informojn pri ĝi. En 1909 mi vidis gramatikon en montra fenestro. Estante nenihava studento mi ofte staradis antaŭ la librovendejo. Scivolemo incitis min. Al mi ŝajnis misteraĵo la artefarita lingvo internacia. Ŝparinte la necesan sumeton mi aĉetis la gramatikon, kiu kontentigis mian scivolemon por unu-du horoj kaj poste mi forgesis la tutan aferon. Ne seniluziigo - mi ja ne estis, estas lingvisto por malice kritiki - sed la zorgoj por la estonteco okupis min pli ol io ajn. Foje en vagonaro mi renkontis italon kaj tiutempe la beleco de la itala lingvo ravis min. Mi lernis kelkajn lecionojn kaj por kontroli mian modestan scion, mi komencis konversacion kun la fremdulo. Je ĝenerala ĝojo de la kun-



Julio Baghy
Laŭ Hungara Heroldo, 1930j.
resp. Bulteno de HEK, februaro 1958.

Tibor Tanka, H-2120 Dunakeszi, Barátság u. 1, Hungario kun intereso pri muziko vola korespondi kun dana junulo aŭ junulino.

30 jara instruistino de mezlernejo B. Davaa; D. Ojunbileg kaj 14 jara lernanto D. Odanasan; 15 jara lernanto M. Chinzorig dez. kor. Ulanbatro, P.O. 21/284, Mongolio.

32 j. profesorino serĉas korespondajn kontaktojn. Nicoleta Railenau, str. Alpinismului 8A, RO-2400 Sibiu, Nagyszeben, Rumanio.

63 j. emerita kemiisto dez. kor. Vasile Albu, str. Eroikor 9, RO-2400 Sibiu, Nagyszeben, Rumanio.

22 jara fraŭlino, Barbara Brys, Lisi Ogon 10, PL-86-065 Lochowo, Polio, dez. kor. kun multaj landoj. Reciproka gastigado eblas.

vojaĝantoj ni parolis per mimiko, gestoj, landkarto, fianĉa ringo, kaj fine mi komprenis, ke la italo estas franca ĵurnalista, parolanta Esperanton.

Mia intereso revekiĝis. La forgesitan gramatikon mi elserĉis el fundo de iu kesto mia. La "kiam" okazis do en 1911. En la retrovita libro nur kelkaj paĝoj estis tranĉitaj por legado. Kun surprizo mi rimarkis la hungarlingvajn artikolojn ĉe ĝia fino. Mi konatiĝis kun la ideo kaj celo de la lingvo. Tute sincere, nur ili kaptis kaj katenis min neforviŝeble al la lingvo kaj movado. La nedefinebla interna ideo faris miraklon: verkiston el lingva sentalentulo. Jen la "kial?" Kaj "kiel?" - Aŭtodidakte, poste instruante mi lernis kaj lernas eĉ hodiaŭ kun sincera respekto al la lingvo, kies beleco ne estas malpli valora kaj evolu-kapabla, ol tiu de iu ajn nacia lingvo. Kun respekto al la lingvo kaj amo al la ideo mi restos fidela lernanto ĝia.

Agado: organizas komisionon por reviziado de manuskriptoj. Kompilas la plej valorajn originalajn verkojn en esperanto por eldoni ilin en serio de *Esperantaj Klasikaĵoj*, kaj por stimuli ilian eldonadon en naciaj lingvoj. Organizas festivalon de originala esperanto-literaturo. Organizas seminarion por nunaj kaj estontaj verkistoj, teatrajn kaj literaturajn konkursojn.

Jarkunveno: okazas ĉiujare en la Universala Kongreso.

Eldonaĵoj: adresaro de la membroj de EVA (en preparo), kaj interna bulteno.

Membreco: Membroj povas esti

- verkistoj de originalaj verkoj en esperanto, kiuj atingis certan gradon de profesieco;
- tradukantoj al esperanto;
- recenzistoj;

- redaktoroj de internaciaj revuoj;
- eldonistoj de esperantaj verkoj.

Novajn membrojn akceptas la Komitato, laŭ argumentita propono de tri membroj. (Proponoj estu senditaj al la sekretario, adreso supre).

Membrokotizo: la duono de la kotizo de MJ de UEA (MJ=individua membro de UEA, en la kategorio "membro kun Jarlibro", la sumo varias de lando al lando, averaĝe ĝi estas 25 guldenoj).

Komitato: Prez.: William Auld. Vicprez.: Julius Balbin, Marjorie Boulton. Sekr.: Willem Verloren van Themaat. Kas.: Alec Venture. Membroj: Gerrit Berveling, Aldo de'Giorgi, George Lagrange, Spomenka Štimec, Tybrucjusz Tyblewski.

(laŭ Gvidlibro de UEA, 1991.)

Aboneblo por la dua duonjaro!

Karaj legantoj,

ŝajne la decido startigi *EVENTOJ*-n ne jar-komence (kion kaŭzis eksteraj teknikaj cirkonstancoj) - havas siajn postsekvojn...

Laŭ la alvenintaj leteroj evidentas, ke la gazeton legas ne nur la abonintoj, sed ankaŭ iliaj konatoj, samklubanoj, ja ni ricevis multajn petojn kaj proponojn enkonduki aboneblon ankaŭ por la dua duonjaro "almenaŭ en la starta jaro".

Estis ja multaj, kiuj ne kredis reala la dusemajnan aperritmon, kaj decidis iom atendi por vidi la rezulton. Por ne elspezi por la malnovaj numeroj, la abono por nur la dua duonjaro ebligas al ili estonte (sed ankoraŭ ĉi-jare) regule ricevi kaj legi la gazeton.

Do, finpensinte la aferon, ni decidis enkonduki tiun abontarifon, kiu validas inter la 1-a de julio kaj 31-a de decembro 1992. Abonkotojn por la unuopaj landoj vi trovas en la apuda tabelo. Ni tre ĝojus, se pri tiu ebleco vi informus ankaŭ viajn konatojn, amikojn.

Esperanta sonkasedo senpage!

Oni (=ni) faras la gazeton, por ke la esperantistoj legu ĝin. Konforme al nia originala celo, ni klopodas aperigi artikolojn, kiuj helpas al movade-nespertuloj orientiĝi en la eventoj de nia komunumo.

Por kreskigi la abonantaron plej efike povas helpi ĝuste la ĝisnunaj legantoj, kiuj plej bone konas la karakteron kaj fidindecon de nia gazeto. Do, se vi kolektos 5 novajn abonantojn al la dua duonjaro de 1992, por simbole danki vian helpon ni proponas al Vi la muzikan sonkasedon de J. Dinnyés: *AL VENKO!*, kiu enhavas 16 esperantajn kantojn, inter ili la melodiigitajn verkojn de tiel famaj aŭtoroj kiel J. Baghy, R. Swchwartz aŭ Zamenhof!

Por ricevi la kasedon vi simple kolektu la abonilojn, kune (!) sendu ĝin al ni, kaj respektive la abonkotojn sendu kaŭne al via kotizperanto!

Se vi estas kontenta pri la ĝisnunaj numeroj, ni dankas vian ĉi-rilatan helpon.

Kun samideanaj salutoj

Szilvási László



Kiel aboni *EVENTOJ*-n?

1. Plenu la abonilon, aŭ skribu leteron kun la sama enhavo, kaj sendu ĝin al la redakcio (LINGVO-Studio, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario).

2. Pagu la abonkoton al vialanda peranto listigitaj sube en la koncerna nacia valuto kaj sumo. (Se estas indikita dolaro anstataŭ vialanda valuto, tio signifas ke vi devas pagi la aktualan ekvivalenton de tiu sumo en via valuto).

3. La revuon vi ricevos rekte el Hungario perpoŝte.

Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirkonto) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapeŝt XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Vi povas sendi ankaŭ euroĉekon. La valuto sur ĝi devas esti en ajna tipo de konvertebla valuto. Sur la dorsa flanko nepre skribu la numeron de via bankkarto!

- En fina kazo - je via risiko - sendu monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

Landaj kotizperantoj

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144).

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).

Brazilio: Brazila Esperanto Ligo, Carlos Maria, Cx. Postal 03625, Brasilia-DF, 70084.

Britio: Paul Hewitt, 26 Higfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT.

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvorak, Jiřska 10, CS-110 00 Praha-1.

Danio: Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J. (Poŝtĝirnumero: 696 47 37)

Francio: UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

Germanio: Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, (konto 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80).

Hungario: LINGVO-Studio, H-1675 Budapeŝt, pk. 87.

Hispanio: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2ª izda, E-39007 Santander (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.)

Israelo: Aviv Faklieru, Pk. 8383, IL-61083

Tel-Aviv, (konto 403679, Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

Italio: Itala Esperanto-Federacio, villa Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

Korea Respubliko: Seula Esperanto-Kulturcentro, Lee Jung-kee, 100-630 C.P.O. Box 3047, Seoul.

Kroatio: Kroatia Esperantista Unuiĝo, Marija Beloŝević, Trg burze 2, 41000 Zagreb.

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

Polio: P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa.

Portugaliao: Libroservo de Portugala Esperanto-Asocio, Antonio Martinus, Rua rd. Joao Conto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

Sud-Afriko: Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town, 8000.

Svedio: Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleeedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

Esperantistoj el eksa Sovetunio, Rumanio kaj Bulgario ĉi-jare ankoraŭ povas aboni la gazeton kontraŭ 10 dolaroj.

Kotizoj por 01.07.-31.12.1992 .

		Eventoj surface	Eventoj aere
Aŭstrio	ATS	177	+30
Belgio	BEF	550	+75
Brazilio	USD	—	10
Britio	GBP	9	+2
Ĉeĥoslovakio	KCS	170	—
Danio	DKK	100	+20
Francio	FRF	90	+15
Germanio	DEM	27	—
Hungario	HUF	470	—
Hispanio	ESP	1800	+300
Israelo	USD	9	+2
Italio	ITL	18000	3000
Korea Resp.	USD	8	+2
Kroatio	USD	9	—
Norvegio	NOK	100	+20
Polio	PLZ	90000	+15000
Portugaliao	PTE	2200	+300
Sud-Afriko	ZAR	40	+10
Svedio	SEK	100	+13
Svislando	CHF	24	+3
Venezuelo	USD	8	+2
ĉiuj aliaj landoj	NLG	30	+4

sendu al: *EVENTOJ*, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario

ABONILO

Jes, mi abonas la gazeton *EVENTOJ* por la dua duonjaro de 1992!

Nomo de la abonanto:

Preciza poŝta adreso:

poŝta kodo:

La abonprezon de (sumo) mi pagis al:

Dato: Subskribo:

Internacia Komercia kaj Ekonomika Fakgrupo, IKEF

La *Internacia Komercia kaj Ekonomika Fakgrupo* kunligas komercajn, ekonomi(k)istajn esperantistojn. Ĝi estis fondita en 1985, kaj celas al la disvastigo de esperanto en la kampoj de komercio, ekonomio kaj ekonomia scienco. Ĝi provas atingi tiun celon per la jenaj agadoj:

- eldoni ĝisdatigitajn fakajn terminarojn;
- ebligi renkontiĝon de la membroj, organizi studseminariojn;
- helpi la membrojn, kiuj uzas esperanton en siaj komercaj rilatoj, ekz. faciligante reciprokajn interŝanĝojn de informoj, ktp;
- eldoni fakan revuon aŭ bultenon kaj/aŭ subteni la eldonadon de tiaj revuoj aŭ bultenoj;
- verki fakajn artikolojn en la esperanta gazeto;
- instigi al aperigo de komercaj anoncoj en la e-gazeto.

Fragmentoj el la raporto pri la agado de IKEF en 1991.

La membraro denove kreskis

Dum la jaro 1991. la membraro denove kreskis, nome de 85 al 102 membroj. Post la forpaso de s-ro Willy Voit (IKEF 17) ni ne plu havas "Dumvivan membro"-n.

La bulteno *La Merkato* iom stumblis

Dum nia komunikilo *La Merkato* en la antaŭa jaro 1990. regule kvarfoje aperis, ĝi iom stumblis en la raportjaro 1991. Aperis nur 2 numeroj. Kaŭzo estis personaj problemoj de la farintoj, ĉefe de nia redaktoro. Ni klopodas reveni en 1992. al denove regula apertito.

Terminara laboro antaŭ nova sukceso

La *Terminara Sekcio de IKEF* sub kunordigado de s-ro Wiersch, Germanio (IKEF 19) daŭrigis sian laboron. Li estas finpreparonta la tradukon de la EK-terminaro "*Ekonomio - Financo - Mono*". Ĉi tiu laboro estas prezentota komence de 1992. al la Komisiono de la Eŭropa Komunumo en Bruselo kaj estos aĉetbla dum la UK en Vieno.

Verka agado malfortiĝis

Bedaŭrinda afero estas la regreso de verka agado dum la raporta jaro. Sole la "*Ekonomia Bulteno pri Usono*" de nia membro d-ro Goldman (IKEF 52) regule ĉiumonate aperis kaj liveris valorajn informojn pri tiu giganta merkato. Ĝian abonon ni varme rekomendas al nia membraro. La klopodoj trovi raportantojn pri similaj aferoj en Eŭropa Komunumo kaj orienta Azio (Japanio + la "kvar malgrandaj tigroj") ĝis nun ne estis sukcesaj. Ni denove alvokas kapablajn membrojn el Eŭropo kaj Orienta Azio al tia agado. Kvaronjara raporto sufiĉas. Taŭga tribuno por tiaj artikoloj estas la revuo *MONATO*, kiun ni ja ĝenerale uzas por nia verka agado. Bedaŭrinde regresis ankaŭ la nombro de artikoloj de IKEF-anoj en *MONATO*, kaj la nombro de peritaj reklamnoncoj de entreprenoj. La revuo *Fokuso*, popularscienca serio de la Ekonomikista Grupo

de HEA (nomata EKOESP), ĉesis sian operadon pro la konataj financaj problemoj en nuna Hungario.


Sukcesan agon faris nia membro d-ro Werner Bormann, Germanio (IKEF 27), kiu konstante lekcias en AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj), kaj kiu eldonis novan 64 paĝan broŝuron "*Entrepenistaj strategioj*".

Praktikaj agadoj


Dum la UK en Bergen, nia membro prof. Bengt-Arne Wickström (IKEF 40) estis aranĝinta du vizitojn de IKEF-anoj kaj aliaj interesitoj ĉe la Komercia Altlernejo en Bergen kaj ĉe la norvega petrolkompanio Statoil. Prof. B. Wickström prizorgis la interpretadon norvege-esperante.

La "Juna Komercia Ĉambro" kun la loka grupo "La Konko" en Oostende, Belgio en komenco de oktobro kun ĉinaj entreprenoj aranĝis kontakt-tagojn "*ĈINA AKTIVE*" pri ĉinaj varoj. La 5-an de oktobro okazis esperantlingva simpozio. Partoprenis kelkaj IKEF-anoj, inter alie sur la podio s-ro Gregoire Maertens (UEA-estrarano, IKEF 29) kiel podiestro, kaj de ĉina flanko profesoro Shen Chenru (IKEF 74). Raporton pri tio vi trovis en *La Merkato* n-ro 35.

Membro nia, nome Alfred Schubert, Germanio (IKEF 126) kreis propran esperantlingvan gazeton pri anoncoj, nomata "*Monda Merkato*", kiu aperas kvarfoje jare. La Estraro de IKEF decidis utiligi tiun anoncgazeton por niaj membroj kaj sendigi la kvar numerojn de 1992. senpage (t.e. je la kosto de IKEF) al ĉiuj membroj.



monda merkato 1992/1
tutmonda informservo kaj anoncgazeto



Generala Kunveno 1991.

La Ĝenerala Kunveno de IKEF membroj okazis kadre de la 76a UK en Bergen, Norvegio, kio elvokis grandan intereson. Krom 13 IKEF membroj ĉeestis 26 interesitoj, kiuj vigle kundiskutis.

Ĉefa temo de la diskuto estis la demando, kiel trakti la multajn proponojn, dezirojn, ofertojn pri varinterŝanĝo, kiuj nun venas de ko-

merciataj esperantistoj el eksocialismaj landoj, el Ĉinio, kaj el la landoj de "Tria Mondo". La ĉeestantoj samopiniis pri tio, ke ellaboro de bona solvo pri tiu demando estas nuntempe la plej grava tasko por IKEF. Tiuj proponoj, deziroj, ofertoj ne malaperu en rubujoj, sed estu diskonigataj al interesuloj! En alia kazo povas okazi, ke tiuj multaj bonvolemaj sendintoj de tiuj proponoj, deziroj, ofertoj seniluziĝos pri la praktika uzo de esperanto, kaj perdiĝos por la movado. Tial la estraro estis komisiita de la Ĝenerala Kunveno, ke ĝi ellaboru taŭgan programon por realigo de tiu afero, kaj la plimulto eĉ pretis akcepti kotizplialtiĝon kaŭzita de tiu afero. Tiu programo poste estis vigle diskutata inter la estraranoj, kaj estis aprobita komence de 1992. (*Detale vidu ĝin en rubriko "Komercia aplikado" de tiu ĉi numero, julio(1)-92. La Red.*)

Resumo

Kvankam la membronombro ankaŭ dum 1991. kreskis al rekorda alteco, kvankam la financa situacio de IKEF estas stabila, kvankam la prilaborendaj taskoj sur la kampoj komercio, ekonomio, ekonomiko estas senlimaj kaj estus fruktodonaj, ni bedaŭrinde unuafoje devis konstati regreson en la sumo de la praktikaj agadoj de IKEF-anoj.

Ŝajnas, ke multaj el la novaj membroj atendas ian servadon al ili. (?!?) Sed la Estraro atentigas pri tio, ke IKEF estas organizaĵo, kiu kunligas komercajn, ekonomi(k)istajn esperantistojn pretajn pri - propra aŭ komuna - agado por la **disvastigo de esperanto sur niaj profesiaj kampoj** komercio, ekonomio, ekonomiko. Do, mi ĝojus, se la **membroj farus ion tiusencajn**, sole aŭ komune kun aliaj. La Estraro planas publikigi en la venonta numero de *La Merkato* kolektaĵon pri taŭgaj agad-ebloj.

Ĝenerala Kunveno en 1992.

Dum la UK en Vieno (vidu la UK-programkajeron).

La Estraro de IKEF

- Franz Josef Braun, *Hornisgrindstr. 8., DW-7580 Bühl 16, Germanio, (prezidanto)*
- Roland Rotsaert, *Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio. Tel: +32-50-330004.*
- D-ro István Gether, *H-1135 Budapest, Palác u. 1, Hungario.*
- Francois-Xavier Gilbert, *Vert Coteau, F-55000 Longeville en Barrois, Francio.*
- D-ro Marco Picasso, *via de Gasperi 7, I-20057 Veduggio al Lambro, Italio.*
- Seiko Yamasaki, *185 Tokyo, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, Japanio.*
- Daniel König, *Schwarzwaldstr. 47. DW-6800 Mannheim 1, Germanio.*

Membrokotizo: 20 NLG aŭ egalvaloro (al la kasisto: Roland Rotsaert).

Kontoj ĉe UEA kaj ĉe FEL: ikef-c, aŭ ĉe la belga poŝtĉekkonto: Bruselo, n-ro 000-1592629-83, je la nomo de IKEF, p.a. Roland Rotsaert.

Organo de IKEF: la bulteno "La Merkato", redaktas Daniel König.

laŭ *La Merkato* n-ro 36.